

Polikarpo el Smirno

La letero al la Filipianoj

El la Greka tradukita de Gerrit Isai Berveling

## *Broŝure:*

Polikarpo el Smirno  
La letero al la Filipianoj  
El la Greka tradukita de Gerrit Isai Berveling  
Voĉoj Kristanaj 36  
VoKo, Rijswijk 2020

*(planita)*

## *Interrete:*

*La originala Greka teksto:*

<https://www.ccel.org/1/lake/fathers/polycarp-philippians.htm>

*Lastfoje kontrolita: 2020-04-26. La retpaĝo ne ĉiam alireblas.*

# *La letero de Polikarpo al la Filipinoj*

## *Επιστολή του Πολύκαρπου προς Φιλιππησίους*

Polikarpo kaj la presbiteroj kun li al la eklezio de Dio, kiu fremdule loĝas en Filipino: kompato kaj paco de Dio ĉiopova kaj de Jesuo Kristo nia savinto abunde verŝiĝu al vi.

### *Gratulo – saluto*

1:1 Mi grande ĝojas kun vi en nia Sinjoro Jesuo Kristo, ĉar vi sekvis la ekzemplon de la vera amo, kaj ilin akompanis, kiel decas al vi, kiuj estas katenitaj en ĉenoj, la indaj ornamoj de sanktuloj, kaj kiuj efektive estas la diademoj de la elektitoj de Dio kaj de nia Sinjoro. 2 Kaj ankaŭ motivo por mia gratulo estas la forta radikoj de via fido, laŭdata de antikvaj tempoj, kiu restas ĝis la nuna tempo kaj fruktigas por nia sinjoro Jesuo Kristo, kiu pro niaj pekoj eltenis renkonti la morton, kaj kiun Dio resurektigis, malligante la dolorojn de la tombo. 3 Ne vidinte lin, vi fidis je li kun ĝojo nedirebla kaj gloroplena, ĝojo kiun multaj deziris eniri, sciante, ke *per pura graco vi saviĝis, ne el viaj agoj*<sup>1</sup>, sed per la deziro de Dio pere de Jesuo Kristo.

---

<sup>1</sup> Efezanoj 2:8-9.

## *Admono al la Kristana vivo*

**2:1** Tial, zoninte la koksojn vi servu Dion en timo kaj vero, forlasante la vanan fanfaronadon kaj la vagadon de la amaso, fidante Lin, kiu levis nian Sinjoron Jesuo Kristo el la mortintoj kaj donis al li gloron kaj tronon je Sia dekstra flanko; al li submetiĝis ĉio, en la ĉielo same kiel sur la tero; lin adoras ĉio, kio spiras, li venos juĝi vivantojn kaj mortintojn, kaj Dio repostulos lian sangon de la mano de tiuj, kiuj ne fidis je li. **2** Sed Li, kiu levis lin el la mortintoj, Tiu vekos ankaŭ nin, se ni plenumos Lian volon kaj iros laŭ Liaj ordonoj kaj amos, kion ankaŭ Li amis, detenante nin de ĉiu malbono, avideco, monhavemo, kalumniado kaj falsaj atestoj; *ne repagante malbonon kontraŭ malbono aŭ insulton kontraŭ insulto*<sup>2</sup>, nek pugnon kontraŭ pugno, malbenon kontraŭ malbeno. **3** Memorante, kion en sia instruado diris la Sinjoro: *Ne juĝu, por ke vi ne estu juĝataj; pardonu, kaj estos pardone al vi; kompatu, por ke oni kompatu vin; per la mezuro, per kiu vi mezuras, oni ankaŭ mezuros pri vi*<sup>3</sup>; kaj *Feliĉaj estas la malriĉaj kaj tiuj, kiuj estas persekutataj pro la justeco, ĉar ilia estas la regno de Dio*<sup>4</sup>.

## *La memoro pri Paŭlo*

**3:1** Tion ĉi, fratoj, kion mi skribas al vi pri la justeco, mi ne skribas el propra impulso, sed ĉar vi antaŭe incitis min. **2** Ĉar nek mi mem nek iu alia simila al mi povas atingi la saĝecon de la beata kaj feliĉa Paŭlo; kiam li estis inter vi, li precize kaj firme instruis al vi la vortojn de la vero en ĉeesto de tiuj, kiuj tiam vivis. Kaj kiam li ne ĉeestis, li sendis leteron al vi, en kiu, se ĝin vi atente studas, vi trovos la manieron fortigi vin en la fido, kiun vi ricevis, kaj kiu, sekvate de espero kaj antaŭate de amo al Dio kaj Kristo kaj nia proksimulo, estas la patrino de ni ĉiuj. ĉar se iu interne estas posedata de tiu graco, li plenumis la ordonon de justeco, ĉar tiu, kiu amas, estas malproksima de ĉiu peko.

---

<sup>2</sup> 1 Petro 3:9.

<sup>3</sup> Mateo 7:1-2; Luko 6:36-38.

<sup>4</sup> Luko 6:20; Mateo 5:3.10.

## *Diversaj admonoj*

**4:1** Komenco de ĉiu malbono estas monavido<sup>5</sup>. Sciante tial, ke ĉar ni nenion enportis en la mondon, ni ankaŭ ne povos ion forporti<sup>6</sup>, ni do armu nin mem per la armaĵo de justeco kaj ni instruu unue nin mem iradi laŭ la ordonoj de la Sinjoro. 2 Due <instruu> viajn edzinojn iradi laŭ la fido, amo kaj sankteco, donitaj al ili, ke ili amu siajn edzojn en ĉiu vero kaj ke ĉiujn ceterajn ili amu egale en plena ĉasteco; kaj siajn infanojn ili eduku en timo antaŭ Dio.

3 La vidvinojn instruu esti diskretaj koncerne la fidon de la Sinjoro, daŭre preĝantaj por ĉiuj, tenantaj sin for de kalumniado, klaĉado, falsa atestado, monavideco kaj ĉiuspeca malbono; ili konsciuj, ke ili estas la altaroj de Dio, kaj ke Li ĉion perceptas, ke nenio kaŝiĝas antaŭ Li, nek rezonado nek pensado nek iu alia sekreto de la koro.

## *Diakonoj, Junuloj kaj Virgulinoj*

**5:1** Sciante do, ke Dio ne estas mokata<sup>7</sup>, ni do devas iri inde laŭ Liaj ordonoj kaj gloro. 2 Same la diakonoj devas esti neriproĉeblaj antaŭ Lia justeco, ĉar diakonoj ili ja estas de Dio kaj de Kristo, sed ne de homoj. Ili ne estu kalumniantoj<sup>8</sup>, falsuloj, aŭ monamantoj, sed ĉiurilate moderaj, kompatemaj, entreprenemaj, irantaj laŭ la vero de la Sinjoro, kiu estis la servanto de ĉiu. Se en la nuna mondo ni plaĉas al Li, ankaŭ la estontan ni heredos, kiel Li promesis al ni, ke Li levos nin el la mortintoj, kaj se ni vivos inde kun Li, ni ankaŭ reĝos kun Li<sup>9</sup>, kondiĉe ke ni fidas je Li. 3 Same, ankaŭ la junuloj estu senmakulaj en ĉio, precipe atentaj teni sian purecon, kaj retenante sin, same kiel kun la novedzino, de ĉiaspeca malbono. Ĉar estas bone, ke ili estu retranscitantaj de la deziroj de ĉi mondo, ĉar ĉiuj karnaj voluptoj militadas kontraŭ la animo kaj nek malĉastuloj, nek

---

<sup>5</sup> 1 Timoteo 6:10.

<sup>6</sup> 1 Timoteo 6:7.

<sup>7</sup> Galatoj 6:7.

<sup>8</sup> Aŭ diabloj (la sama vorto).

<sup>9</sup> 2 Timoteo 2:12.

*malmoruloj, nek viruzaĉantoj, heredos la regnon de Dio*<sup>10</sup> nek tiuj, kiuj faras neindajn aŭ maldecajn aferojn. Tial estas necese deteni sin de ĉiaj tiaj aferoj, estante submetitaj al la presbiteroj kaj diakonoj, kvazaŭ al Dio kaj Kristo. Ankaŭ la virgulinoj iradu en senmakula kaj pura konscienco.

### *Prebiteroj kaj aliaj*

**6:1** La presbiteroj estu kompatemaj kaj pardonemaj pri ĉiuj, rekondukante la erarantojn, vizitante ĉiujn malsanulojn kaj ne neglektante vidvinon, orfon aŭ malriĉulon; sed ĉiam atentante pri la bono antaŭ Dio kaj homoj, detenante sin de ĉiu kolero, parteco, maljusta juĝo, longe-fortenante sin de ĉiu mon-amikeco, ne rapide kredante akuzojn kontraŭ iu ajn, ne severaj en siaj juĝoj, konsciaj, ke ni ĉiuj kulpas je pekoj. **2** Se la Sinjoron ni petas, ke Li pardonu nin, ankaŭ ni devas ja pardoni; ĉar ni ja estas antaŭ la okuloj de la Sinjoro kaj de Dio kaj *ni ĉiuj staros antaŭ la tribunala seĝo de Kristo kaj ĉiu devos respondi pri si mem*<sup>11</sup>.

**3** Tiel ni do servu lin en timo kaj ĉiu respekto, kiel li mem ordonis al ni, kaj kiel <same ordonis> la apostoloj, kiuj mesaĝis la evangelion al ni, kaj la profetoj, kiuj anticipe mesaĝis la alvenon de nia Sinjoro: ni strebu al la bono, retenu nin de tio, kio skandalas, de pseŭdofratoj, kaj de tiuj, kiuj hipokrite portas la nomon de la Sinjoro por misvojjigi vanajn homojn.

### *Evitu Docketismanojn, kaj estu konstantaj en fastado kaj preĝado*

**7:1** *Ĉiu, kiu ne konfesas, ke Jesuo Kristo venis en la karno, estas Antikristo*<sup>12</sup>; kaj kiu ne konfesas la martirmorton sur la kruco, tiu estas el la diablo: kaj kiu pervertas la dirojn de ka Sinjoro al siaj propraj deziroj, kaj diras, ke estas nek resurekto nek juĝo, tiu estas unuenaskito de Satano.

---

<sup>10</sup> 1 Petro 2:11; 1 Korintanoj 6:9-10.

<sup>11</sup> Romanoj 14:10.

<sup>12</sup> 1 Johano 4:3.

2 Tial, forlasante la vanecon de la amaso kaj iliajn pseŭdoinstruojn, ni do reiru al la parolo, kiu estis transdonita al ni deorigine, ni sobriĝu en preĝado, eltenu en fastado, petegu en niaj preĝoj la Dion, kiu ĉion vidas, ke *Li ne konduku nin en tenton*<sup>13</sup>, ĉar ja diris la Sinjoro: *la spirito ja estas fervora, sed la karno estas malforta*<sup>14</sup>.

### *Eltenu en espero kaj pacienco*

8:1 Ni do daŭre eltenu en nia espero, kaj en la garantio de nia justeco, kiu estas Kristo Jesuo, kiu *portis niajn pekojn en sia propra korpo*<sup>15</sup> sur la lignaĵo; *pekon li ne faris, kaj neniu fiaĵo troviĝis en lia buŝo*<sup>16</sup>. Sed pro ni, por ke ni vivu en li, ĉion li eltenis.

2 Ni do fariĝu imitantoj de lia pacienco. Kaj se ni suferos pro lia nomo, ni laŭdu lin. ĉar tiun ĉi ekzemplon li donis en propra persono, kaj ni fidis je li.

### *Pacience eltenu*

9:1 Vin ĉiujn mi admonas, ke vi obeu la parolon de la justeco, kaj ke vi pacience eltenu ĉion, kiel vi ankaŭ vidis per viaj okuloj ne nur ĉe la feliĉaj Ignacio, Zosimo kaj Rufo, sed ankaŭ ĉe la aliaj inter vi, kaj ĉe Paŭlo mem, kaj ĉe la ceteraj apostoloj; 2 <faru tion> en la certeco, ke *ĉiuj ili ne vane kuris*<sup>17</sup>, sed en la fido kaj en justeco, kaj ke nun ili estas la loko, kiu konvenas al ili ĉe la Sinjoro, kun kiu ili ankaŭ suferis. ĉar ili amis ne la nunan mondon, sed Lin, kiu mortis pro ni, kaj kiu pro ni de Dio estis restarigita.

---

<sup>13</sup> Mateo 6:13.

<sup>14</sup> Mateo 26:41.

<sup>15</sup> 1 Petro 2:24.

<sup>16</sup> 1 Petro 2:22.

<sup>17</sup> Filipianoj 2:16.

## *Admono al virta vivado*

**10:1** Forte vi staru, kaj sekvu la ekzemplon de la Sinjoro, firmaj en la fido kaj neskueblaj, amantoj de la frateco, reciproke amplenaj, unuigitaj en la vero, montrante inter vi reciproke la mildecon de la Sinjoro, kaj malŝatante neniuon. 2 Se vi povas agi bone, ne prokrastu tion, *ĉar kompatemo liberigas de la morto*<sup>18</sup>. Vi ĉiuj submetiĝu reciproke, havante neriproĉeblan interrilatadon ĉe la paganoj, por ke el viaj bonaj agoj vi ricevu laŭdon<sup>19</sup> kaj la Sinjoro ne estu pro vi blasfemata. 3 Sed ve, pro kiu la nomo de la Sinjoro estas blasfemata. Ĉiuj do vi instruu sobrecon, kaj reciproke en via konduto ĝin montru.

## *Pri la presbitero Valento*

**11:1** Mi estas tre tristigita pro Valento, kiu ĉe vi foje fariĝis presbitero, ĉar tiel malmulte li komprenis la lokon, kiun li ricevis <en la eklezio>. Mi do admonas vin, ke vi retenu vin de avareco kaj estu ĉastaj kaj veramaj. *Detenu vin de ĉia formo de malbono*<sup>20</sup>. 2 Ĉar se viro ne povas regi sin en tio, kiel li instruu al aliaj? Se de avareco li ne retenos sin, de idoladorado li estos malpurigita, kaj kvazaŭ inter paganoj li estos kalkulata, kiuj ne konas la juĝon de la Sinjoro. Aŭ ĉu ni ne scias, ke *la sanktuloj juĝos pri la mondo*<sup>21</sup>, kiel instruas Paŭlo. 3 Sed almenaŭ mi nenion tian vidis nek aŭdis inter vi, inter kiuj laboris la benata Paŭlo, kaj kiuj estas menciitaj komence de lia letero. En ĉiuj tiuj eklezioj, kiuj nur tiam konis Dion, li ja fanfaronis pri vi; sed ni <en Smirno> ankoraŭ ne konis lin. 4 Forte mi tamen, fratoj, estas tristigita pro li <Valento> kaj lia edzino, al kiuj la Sinjoro donu merititan pentadon. Estu do sobraj en ĉi tio; *kaj ne konsideru ilin malamikoj*<sup>22</sup>, sed revoku ilin kiel suferantajn kaj erarantajn membrojn, por ke vi savu vian tutan korpon. Tiel agante vi ja edifos vin mem.

---

<sup>18</sup> Tobit 4:10.

<sup>19</sup> 1 Petro 2:12.

<sup>20</sup> 1 Tesalonikanoj 5:22.

<sup>21</sup> 1 Korintanoj 6:2.

<sup>22</sup> 2 Tesalonikanoj 3:15.



## *Diversaj admonoj*

**12:1** Mi ja konfidas, ke vi estas bone instruitaj pri la sanktaj skriboj, kaj ke nenio en ĝi por vi estas kaŝita; sed mi ankoraŭ ne havas tiun privilegion. Kiel diriĝas en tiuj skriboj, *Tremu kaj ne peku*<sup>23</sup>, kaj *La suno ne subiru sur via kolero*<sup>24</sup>. Benata, kiu tion memortenas; tion mi kredas reala en vi.

2 Sed la Dio la Patro de nia Sinjoro Jesuo Kristo, kaj li mem – la eterna pontifiko – la Filo de Dio Jesuo Kristo – konstruu vin en la kredo kaj la vero, kaj en ĉiu mildeco kaj sen koleriĝemo, en pacienco kaj grandanimeco, en toleremo kaj ĉasto; kaj Li donu al vi sorton kaj lokon inter siaj sanktuloj, kaj al ni, al vi kaj al ĉiuj, kiuj estas sub la ĉielo, kiuj fidos je nia Sinjoro Jesuo Kristo, kaj je Lia Patro, *kiu levis lin el la mortintoj*<sup>25</sup>. 3 Preĝu por ĉiuj sanktuloj. *Ankaŭ preĝu por reĝoj kaj por ĉiuj eminentuloj*<sup>26</sup> kaj por princoj, kaj por tiuj, kiuj persekutas kaj malamas vin, kaj por la malamikoj de la kruco, por ke via frukto estu manifesta inter ĉiuj, por ke vi estu perfektaj en Li.

## *Pri la plusendado de la leteroj*

**13:1** Vi skribis al mi, kaj vi kaj Ignacio, por ke, se iu ajn iros al Sirio, li kunportu vian leteron kun si; tiun peton mi plenumos, se oportunan eblon mi trovos, ĉu persone, aŭ pere de iu reprezentanto por mi, por ke plenumiĝu via deziro. 2 La leterojn de Ignacio, de li senditajn al ni, kaj aliajn, kiujn ni havas ĉe ni, ni sendis al vi laŭ via peto. Ili aldoniĝis al tiu ĉi letero; el tio vi grande povas profiti. ĉar ili temas pri la fido, pri pacienco kaj ĉio, kio edifas en nia Sinjoro. Kaj pri Ignacio mem kaj tiuj, kiuj estis kun li, vi bonvole informu nin, se pli firmajn informojn vi havas.

---

<sup>23</sup> Psalmo 4:4.

<sup>24</sup> Efezanoj 4:26.

<sup>25</sup> Galatoj 1:1.

<sup>26</sup> 1 Timoteo 2:2.

## *Saluto*

**14:1** Tion al vi mi skribis pere de Krescento, kiun ĝis nun kaj same en la nuno mi rekomendas al vi. Li ja senkonteste bone agis inter ni, kaj mi kredas, ke same rilate al vi. Lian fratinton vi krome alte estimas, kiam ŝi vizitas vin. Estu sendanĝeraj en la Sinjoro Jesuo Kristo. La graco estu kun vi ĉiuj. Amen.

---